

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2025. №1



Nuntepa hispana engaĝiginta poezio.

Alberto García-Teresa

En diversaj numeroj de *La Ondo*, mi jam konigis al ties legantaro la ekziston kaj la personecon de Alberto García-Teresa kaj eĉ erojn el lia elstara, diversa kaj ĉiam pli ampleksa verkaro. En la numero 315a, mi prezentis al vi mian tradukon de kolekto da mikronoveloj de ĉi hispana beletristo el lia libro *Callejero de Manglar* [Gvidlibro pri Manglejo]. Pri la aŭtoro, mi skribis jenan (kun nur kelkaj retuŝetoj) prezenton, taŭgan ankaŭ por ĉi okazo:

«Alberto García-Teresa (Madrido, 1980) estas doktoro pri hispana filologio, poeto, eseisto, mikronovelisto, literaturkritikisto... kaj senlaca kultura aktivulo. Lia doktora disertacio *Poesía de la conciencia crítica* [Poezio pri la kritika konscienco], sekvigis la estiĝon de samnoma prestiĝa poezia skolo, en kiu mi estas rigardata de kelkaj kiel “la voĉo de Esperanto en la grupo”.

«García-Teresa ne estas esperantisto, sed li esperantamas. Ĝuste li proponis la publikigon de la antologio *Nova mondo en niaj koroj*, kolekto da poemoj de 20 tiuskolaj hispanaj poetoj, en mia esperantigo, al kiuj li aldonis soci-kritikajn poemojn Esperante verkitajn de tri Esperanto-poetoj: Suso Moinhos, Jorge Camacho kaj mi mem. Kuriozas kaj famas poezia aranĝo de li organizita, interalie, en 2017: migra opa poemdeklamado en diversaj placoj de la madrida popola kvartalo Malasaña. Partoprenis 25 gepoetoj, inter ili mi mem, kiu, petite de García-Teresa, deklamis miajn poemojn en la hispana kaj en Esperanto. De tiam, en ĉiuj tiuspecaj aranĝoj de la grupo mi petatas deklami dulingve. Kaj tiu respekto al la Esperanto-poezio tre feliĉigas min».

La pasintan printempon la madrida eldonejo Lastura publikigis la libron *La palabra y el viento*, kolekton da kvin noveloj, en mia hispanigo, el mia novelaro *La vorto kaj la vento*, publikigita de Mondial en 2016. Tiun hispanlingvan eldonon Lastura metis je dispono de la publiko kadre de la fama Madrida Libro-Foiro, kie la alportita stoko de la novelaro tiel sukcese disvendiĝis, ke mi estis petita pri subskribo de ekzempleroj en du okazoj. Nu, la prologon de la verko aŭtoris ĝuste Alberto García-Teresa. En la 50a numero de *Beletra Almanako* legeblas, en mia esperantigo, tiu prologo, kie aperas plej pozitive substrekitaj i.a. la esperantlingva deveno de la tekstoj kaj la esperantista aktiveco de ilia aŭtoro, mi mem, kio konsistigas belan agnoskon de la valoro de la Esperanto-literaturo.

La pasintan 28an de februaro García-Teresa sukcese prezentis sian lastan poemaron *El áspero dolor de la esperanza* [La aspra doloro de l' espero], el kiu mi elektis kaj esperantigis por vi legantoj de *La Ondo* kelkajn poemojn.

Miguel Fernández



Alberto García-Teresa (Foto: Jimena Cuerva)

Poemoj de Alberto García-Teresa

VIVO EN TEMPOJ DE KOLAPSO

Elĉerpiĝas nia tempo,
sed ni forigas plu la horizonton kun afektaj
mokemaj gestoj, distilante orgojlon kaj strabismon.

Ĝi elĉerpiĝas,
sed ni la kalkulilojn tenas aktivaj
kaj desegnas liniojn, kiuj trairas la ekblovojn
por forkonsumi ajnan lum-ŝtonon
kapablan pliigi la profito-kontojn.

Sen tempo,
kaj ni serĉadas, kiel refirmiĝi,
kie trovi la ŝtoneton, kiu fine

alĝustiĝos al la eksponilo de nia identeco,
dum ni buliĝas ene de ni mem.

Tagoj al ni apenaŭ restas,
sed ilin ni forskuas kun ĝojo kaj sen intereso,
adorante la laĉon, kiu nin malnodas el la mondo,
konkurante en kurado pri konsumo
kaj distroj por ne senti la amaron
de l' abismo, por tute ne prononci
la vortojn traborantajn niajn pulmojn.

Finiĝas nia tempo,
sed ni obstinas la murojn priŝteli
por starigi pli bonajn spegulojn.
Kaj ni restriktas la brakumojn
por malnodi la rigardojn
kaj tegmenti nin per niaj ripoj.

Proksimiĝas la fino,
kaj ni plue ornamas nian tombon
per varoj, per aspiroj kaj per la
lasta herbero, kiu kreskis
rande de la nuno.

Finiĝas ja la tempo,
ne tiu de niaj individuaj paŝoj,
sed tiu de la armaturo el ostoj, arboj kaj fluidoĵoj,
kie ni disvolviĝas.

Tion ni scias. Tion ni agnoskas.
Tion ni provas ignori.

Ni vivas inter stertoroj,
sed ni plue saltadas tiuloke,
mordante la nubojn per nia rigardo
kaj inkmakulante la grandon de la planko,
kiu disfendiĝas.

Ni vivas en tempoj de kolapso
kvazaŭ naivaj semoj de printempo.

* * *

KIEL DO NOMI la homojn, kiuj desegnas vojon
finiĝantan per abismo?

Kiel do la homojn, kiuj donacas al ni la fuelon
por traveturi ĝin?

Kiel do la homojn tion aplaŭdantajn?

Kaj kiel nomi nin,
kiuj trairas tiun vojon?

* * *

NUR LOKO,
kie eblas aŭskulti birdokantojn,
devus esti rigardata loĝebla.

* * *

SE ONI PLILARĜIGOS nian kaĝon
kaj ene de ĝi ni povos flugi,
kuri ĝis la stangoj stompiĝos al la vido,
ĝis oni en ĝi staplos landlimojn
kaj eĉ forgesos ni la ŝlosil-lingvon,
ĉu ni estos liberaj?

FUĜO

1

Kiu do povas al si permesi la privilegion
retiriĝi, fuĝi
komforte kaj sekure
sub novan plafonon,
sekan kaj friskan,
apertan al konvinkoj,
kie ĉiaj kontraŭdiroj diluiĝas,
krom tiu pri plej esenca individuismo?

Kaj se la fuĝo estas
 surmeto de la botoj,
 pet' al la hundo,
 ke ĝi vin akompanu al kamparo,
 kaj vojad' pli-kaj-plia
 kaj spiro de distanco,

kial do ne semi ian elon
 ene?

Kiel ni religiĝu
 kun la helik', la milvo,
 l' akaci', la filiko,
 kun la eldomigit' kun la migranto,

se ni havas la fingrojn okupitaj
 en ŝu-laĉado.

LECIONO EL MIKROSKOPO

Ĉio konsistas el
 pli etaj elementoj kunigitaj.

Iuj aĵoj, eĉ el ege etaj,
 kaj ege kunigitaj.

Ni estas aro.

* * *

LA VORTO "NI"
 povas enteni multajn dratbarilojn,
 haloojn,
 kiuj enabismiĝas, markojn,
 kiuj tamponas la vejnojn,

sed ankaŭ plurajn pordojn
apertajn, horizontojn,
kiuj ĉe hulo disfaldiĝas, panbulojn,
kiujn oni kunmanĝas, litojn,
por dormado
en kuno.

La reto, kiu nin tenos staraj,
estos el manoj, ne el kratago.

La armaturo, kiu nin protektos,
estos ja el kompat', el empatio,
sed ne el pasportoj.

Alvenas l' incendio.
Alvenas la momento ĝusta
por ke ni nin akompanu en la falo
kaj starigu la komunan domon de l' espero;
kaj instaliĝu jam en la brakumo.

* * *

VIN JA TRAFAS brakumo el sereno,
kiam vi karesas la dorson de alia besto.
Tio egalas: palpi l' amplekson de la vivo;
konstati, ke malsamas la kadenco de aliaj kor-batoj;
spiradon, kun kiu vi ne povas akordiĝi,
sed kiu vin fratigas kun ĉio viva,
kun tio vin ne scii unika nek eksterordinara,
sed nur plia peceto
de la gutoj, kiuj teksas l' universon.

* * *

LA ESPERO ESTAS
tiu naĝ-tiro, kiu nin impulsas
al la marsupraĵo, kiam ni sinkas.

Fojfoje
ni ŝatus havi ĝin ĉemane,
kvazaŭ lampiron petolan,
kapablan nin orienti,

aŭ pensi pri ĝi kvazaŭ pri ankro
aŭ pri gastama rifuĝejo.

Sed ĝi estas vipo,
fulmobrilo,
bruska movo,


ia impeto de ribelema spirado sub la akvo.

* * *

MALGRAŬ KE ni havas la langon
karia pro koŝmaroj,
la manojn naŭzitaj de ulceroj
kaj la piedojn en kolizio, unu kontraŭ la alia,
spite la ardon de la lamado,
puriginte je memmensogo la okulojn
kaj kurtenizinte per utopio-kavoj
la pluvon ĉe vojado,

jen ni antaŭeniras kune kun la espero
truadante la nunon.

BAZA LITERATURA KRESTOMATIO



Tuta biblioteko en unu volumo
Nova eldono korektita kaj ampleksigita
199 verkoj aŭ fragmentoj de 82 aŭtoroj
Kuneldonis *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio
368 paĝoj
Prezo: 27 eŭroj
Aĉetebla ĉe UEA kaj aliaj libroservoj